

# INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA  
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare  $\frac{1}{2}$  Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :- :-

## Protesto.

La Centra Propaganda Komitato de l' Bulgara Esp. Societo sendas „Proteston”, kiel respondo al la artikolo „La Milito” en Dec.-no. de 1912.

Nominte la aŭtoron de tiu artikolo malica Tartufo, homo, „en kiu de unu flanko parolas, kun sia tuta malico, la rasa malamo, kaj de alia — la sento de minacata persona certeco, konsiderante la tuteŭropajn komplikadojn”, la „Protesto” daŭrigas:

„Foriginte la maskon, ĉiuj ofendoj, kiom ajn malicaj, neĝustlokaj kaj malpuraj ili estas, kaj ankaŭ la nescio de la aŭtoro, estas klarigeblaj, kvankam tute ne pravigeblaj. Kaj ni eĉ minuton ne perdus por protesti, se antaŭ ni starus sole la aŭtoro de la artikolo, ĉar estas nia regulo al la malico respondi per silenta malestimo.

Sed pro estimo al la legantoj ni trovas, ke estas necese per la nuna protesto montri de unu flanko la malnoblajn instigojn de la aŭtoro, instigoj des pli malnoblaj, ĉar ili trovis esprimon en la paĝoj de *socia* revuo; kaj de alia — protesti kaj refuti la cinikajn kalumniojn jetitajn al adreso de tutaj du popoloj. Ĉar tiuj ĉi kalumnioj havas nenion komunan kun la efektiveco. Vere, ĉiu milito estas terura. Kaj ni, kiuj travivis militon, komprenas senpere la tutan sencanon de la vorto „terura”.

Sed milito, gvidata de unu parto de la popolo por dono de homaj rajtoj al la alia parto, estas pravigita de vidpunkto ne sole de „avida kapitalismo”, sed ankaŭ de la sanktaj principoj, proklamitaj de la revolucio de 1789 por



la rajtoj de la homo kaj de la civitano <sup>1)</sup>, ĉar nobla afero estas la sinofero por dono de homaj rajtoj al alia homo, des pli kiam la lasta estas lia frato. Kaj oni ne devas ne konsideri, ke ĝis la nuna milito elementaj homaj rajtoj por la kristanoj, ekzemple persona kaj posedaja certeco, ne ekzistis en Turkujo. Ĉi tion eĉ Eŭropo mem konfesis kaj siatempe estis devigita sendi siajn komisararojn por helpi, tamen sen sukceso.

Kaj depost kiam la junturkoj kaptis la regadon, ne nuria esenca plibonigo ne fariĝis, sed komenciĝis tia laŭsistema ekstermado de la kristana loĝantaro, kiel okazas tio kun la Poloj en Prusujo (kiujn la aŭtoro de la artikolo „La Milito” ne forgesu, parolante pri Finnlando), ke la situacio fariĝis netolerebla. Ĉe tia situacio, la ĝishieraŭa sklavo, kies patron kaj fraton certaj rabistoj turkaj — ni substrekas la vorton „certaj”, ĉar ne ĉiuj turkoj estas rabistoj — mortigis, malvirigis fratinon kaj fianĉinon <sup>2)</sup>, eble sin venĝis dum la tempo de la senregado.

Sed estas fakto ne pridiskutebla, ke ĉie kun la alveno de la orda armeo estis ne nur reenkondukata ordo, sed ankaŭ ĉiaj furiozajoj fariĝis neeblaj. Pruvo: la reveno de la forkurinta Turka loĝantaro tuj post la alveno de la orda armeo.

La Bulgaroj kaj ankaŭ la Serboj havas la homajn kaj civitanajn virtojn, apartenantajn al la slavaro: ne fordoni sin al la sentoj de la malfortulo — malico kaj venĝo.

Kaj el la pli supre nomitaj unikaj eblaj okazoj de furiozajoj, de la ĝishieraŭa sklavigitaj Bulgaroj aŭ Serboj, fari ĝeneraligojn, kiel tiuj de l' aŭtoro de „La Milito”, kaj ĵetadi, post tio, malpurajn kalumniojn al adreso de tutaj du popoloj, ĉi tion la sana homa prudento ne povas fari.

Popoloj, oferantaj siajn plej karajn bonojn en la nomo de tia alte-humana ideo, kia estas la dono de homaj rajtoj al la sklavigito kaj tio tute konscie (ĉar oni ne devas forgesi, ke en Bulgarujo estas nur 5 % da homoj ne sciantaj legi kaj skribi), ne povas esti popoloj de sovaĝuloj.

1) Memoru la aproban opinion pri la Balkana milito de Ellen Key k. a.

2) Sufiĉe estas rememori pri la mortigadoj en Ŝtip kaj Koĉane, pri ĉirkaŭrabitaj kaj detruitaj vilaĝoj en la valo de r. Struma kaj Bregalnica, pri la bruligitaj 200 vivaj homoj, Bulgaraj unuagradaj urbanoj, en la kazerno de Demir-Hisar, kiel ankaŭ pri la terura buĉado en Ajvali.

Respondeto de l' „aŭtoro”:

Denove peno, prezenti la balkanmiliton kiel lukto belega en servo de justeco k.t.p., lukto, kiun la tuta mondo devas admiri, je puno esti nomata Tartufo, rasmalamanto k.c.

Estas kelkaj rimarkoj. Ĉu ne estas iom strange, ke oni malkovris la belecon kaj la admirindecon de tiu tiom glorigata milito nur post ĝia sukcesplena komenco? Ni memoras, ke en la bulgara kaj serba parlamentoj la izolitaj soc. deputitoj protestis kontraŭ tiu milito; ankaŭ, ke la partioj soc. de ĉiuj balkanlandoj protestis kontraŭ ĝi. En Sofio, 15an de aŭgusto, je 25-jara jubileo de veno de reĝo Ferdinand, la soc. dem. partio havis kunvenon kun la devizo: „Milito al la milito!” Oni tiam konstatis: ke la patriotoj, la ŝovinistoj, postulis militon. Ankaŭ: „ke la buĉadoj ne estas tiom frukto de la turka krueleco, ĉar la turka popolo, kvankam malklera kaj fanatika, estas sufiĉe pacema. Ili (buĉadoj) pli prave estas frukto de la incitado de la ŝtato, de la registaro mem kaŭzata.”

La kontraŭmilita „Manifesto de l' Socialistoj de Balkanujo” (I. S. R. Nov., p. 118) diras: „Sed ni, socialistoj de l' Balkanlandoj, ni ne lasos kuntreni nin de la fluo ŝovinista... La proletario de l' Balkanlandoj povas nenion gajni per tiu aventuro... Kio koncernas la politikajn kaj la publikajn liberecojn, ili estos detruataj per la militarismo kaj monarkismo, kiuj, plifortigitaj per sia sukceso kontraŭ la turkoj, postulos novajn kreditojn por la armeo, novajn privilegiojn por la monarkoj... La naciismo nenion faras ol ŝanĝi la nomon de la mastroj, kaj la gradon de subpremo, sed ne forigas ilin... La vera motivo... estas la tendenco je disvolviĝo ekonomia kaj teritoria, kiu karakterizas ĉiujn landojn kun kapitalista produktado... Al la milito, kiun ni repuŝas per niaj ĉiuj fortoj kiel solvigilon de la politikaj kaj sociaj problemoj, ni kontraŭmetas la agadon per ĉiaj rimedoj de la konsciaj kaj organizitaj amasoj... Al la sanga idealo... ni respondas ripetante nian solvon, jam proklamitan ĉe la interbalkana socialista konferenco en Belgrado dum 1909... For la milito!” Jen kelkaj konsideroj el tiu manifesto.

La aŭtoro skribis pro timo pri sia minacata *persona* certeco, diras la „Protesto”. La aŭtoro povas respondi, ke la „Protesto” havas, eble, tian motivon. Ĉar estas danĝera, inter militemuloj, malaprobĉi militon. Pli facile estas miksi sian voĉon en la ĝeneralan ĥoron!

Pli verŝajne, tamen, estas, ke la milito mem konvertis niajn balkanajn kamaradojn en militemuloj. Personoj, antaŭ



kelkaj semajnoj ankoraŭ estante kontraŭ la milito, hodiaŭ entuziasme aplaudas, glorigas, admiras ĝin. Kaj de monato al monato ili iĝas pli militemaj! Jen la infekta efiko de milito.

Unu parto de popolo batalas por la alia, diras la „Protesto”. Por alia popolo, aŭ parto de alia popolo, oni ne batalus; ne la subpremado mem igas ilin batali, sed la cirkonstanco, ke tiun subpremadon suferis parto el la propra nacio. Sekve, laŭ ni: pura patriotismo. Laŭ la sama principo preskaŭ ĉiu nacio tuj povus deklari militon al alia nacio. Ke en la Balkanmilito ŝovinismo superregas, tion montras ankaŭ la sintenado rilate al la, alirasaj, grekoj. Kaj baldaŭ ni, eble, aŭdos pri disputoj inter bulgaroj kaj serboj.

Por ni, socialistoj, milito estas aŭ estu tro barbara, tro abomena, tro terura por venkinto kaj venkito, ke ni povus akcepti ĝin por atingi kian ajn celon. Ĝi devas malaperi de la tero; ni estu, senkondiĉe, kontraŭuloj de ĉiu milito, same kiel de kiu ajn formo de mortpuno. La Balkanmilito estas grandskala apliko de l' mortpuno, kaj al aliaj ol al tiuj, kiuj faris la punatajn krimojn.

Pli kaj pli pruviĝas, ke patriotismo estas nuntempe la plej danĝera, kaj samtempe la malplej facile ekstermebla burĝa malvirto, kiu ankoraŭ restas por kontraŭbatali!

Se niaj k-doĵ bulgaroj k. c. timas, ke pro en la dec.-nro de l. S. R. cititaj hontindajoj — pri kiuj estis plena la tuta presaro de Eŭropo — ili ne estos konsiderataj kiel kulturpopoloj, tiam ili povas esti kvietaj. Ili ja pereigis centmil homojn — ili de nun havas do honorplenan lokon inter la civilizitaj landoj!

En tiu ĉi sama n-ro oni trovos komencon de treege interesa studo pri la antaŭhistorio de l' nuna milito. Estas partoj el libro de Otto Bauer <sup>1)</sup>, aŭstria socialisto, kiu penas nudigi la pli profundajn ekonomiajn kaj sociajn kaŭzojn de l' Balkanmilito.

## La Balkanmilito.

(El libro sub tiu titolo de OTTO BAUER <sup>1)</sup>, Aŭstria socialisto.)

La Balkankrizo, kiu, ŝajne, kaŭzos disfalon de l' Turka imperio, havas du kaŭzojn: 1e, sociaj antitezoj, pliakraĝitaj de naciaj kaj religiaj antitezoj; 2e, la politiko de l' Eŭropaj

<sup>1)</sup> Otto Bauer, „Der Balkankrieg”.

grandŝtatoj, kiuj por propra profito nebligis ĉiun internan refortigon, ĉian gravan reformon en Turklando kaj kiuj tial estas respondeca por la fakto, ke malsukcesis la penoj de Turkujo por modernigi sin. Ni iom ellaboru ambaŭ kaŭzojn.

La granda kovejo de ribeloj kontraŭ la centra regado en Konstantinoplo, estis — por Eŭropa Turklando — Makedonujo. La bando-estado, kiu tie furiozis, elpremante kaj elrabante la loĝantaron, preskaŭ plene lamigis kaj elartikigis la tutan socian vivon. La terkulturisto neniam estis certa pri sia rikolto, neniam certa pri sia posedajo: kion li povis savi el la manojn de l' fisko, tio estis forprenota de bandoj da armitaj rabantoj, kiuj ĉu hodiaŭ ĉu morgaŭ venos elrabili lin.

Proksimume la mezon de l' pasinta jarcento penetris en Makedonujon kapitalismo. La malnovaj formoj de produktado nur por propra konsumado anstataŭiĝis de vendajproduktado, t.e. produktado de aĵoj por ne mem konsumi sed vendi ilin. Tiu disvolvado estis akcelata, unuflanke de konstruo de fervojoj, aliflanke de pliiĝo de l' nacia ŝuldo.

La fervojoj, konstruitaj per fremda kapitalo, enportis okcidentajn produktaĵojn en la primitivajn vilaĝojn, kaj tiel naskis inter la loĝantoj deziron kaj bezonon aĉeti ilin. Por tio necesis mono. Por tion akiri, parto de l' rikolto estis vendata, kio nun povis okazi, ĉar la fervojoj ebligis la forsendon de greno al havenurboj kaj al komercocentroj.

La ŝtata ŝuldo konstante kreskadis pro la neceseco por Turkujo: havi fortan armeon. Ĉirkaŭate de malamikoj, ĉiam devigate havi je ĉiumomenta dispono multnombrian soldataron por sufoki ribelemajn movadojn de iu submetita popolo en la vasta imperio — Turklando devis elspezi sumojn gigantajn por modernaj militaĵoj. Pro tio ĝi pli kaj pli ensuldiĝis ĉe Eŭropaj kapitalistoj, kiuj pruntis al ĝi la monon per kiu ĝi pagis la militbezonaĵojn. La fino de tio estis, ke la kontrolo je la Turkaj financoj estis metata en manojn de financa komitato, konsistanta el reprezentantoj de Eŭropaj bankoj. La enspezoj el monopoloj (je tabako kaj salo) kaj el diversaj impostoj, de tiam ne plu fluadis en la kason de l' ŝtato: ili venis en la manojn de grupo da internaciaj bankistoj, kiuj per ili pagis la rentojn al la ŝuldataj. Pro tio la Turka registaro estis devigate treege altiĝi la ceterajn impostojn, por havigi al si sufiĉajn enspezojn. La malriĉiĝintaj kamparanoj do estis ĉiam pli elsuĉataj — ilia situacio similis tiun de l' franca kamparano tuj antaŭ la granda revolucio.



Tuja sekvo de tiu socia elvolvo estis: pliakrigo de l' klasantitezoj. Kun feŭdalismo malaperas la feŭdalaj rajtoj de l' terposedanto (spahi); li prenas novan funkcion: li iĝas ekspluatanto de impostoj. Ĉar la impostoj ne estas pagataj rekte al la ŝtato. Ili estas forluitaj, kun la kutimaj sekvoj: elpremegado, subaĉetado k.t.p. La kamparano, por povi pagi, vendas subvalore sian rikolton al la terposedanto-impostprenisto, kaj pli kaj pli pereas en mizero.

Tiuj klasantitezoj estas sentataj pli profunde ankoraŭ pro tio, ke ili ne nur havas socian karakteron, sed ankaŭ nacian kaj religian. La terposedantoj estas Turkoj kaj Mohametanoj; la subpremataj kamparanoj estas Slavoj kaj Kristanoj. Jam pro tiuj du kaŭzoj justeco ne estas por la lastaj akirebla en Konstantinoplo — ĉar la Turka ŝtato, regante super fremdaj, submetitaj popoloj, ne povas malpravigi Turkajn terposedantojn en favoro de Slav-Kristanaj terkulturistoj. Per tio ĝi ja tuŝus la fundamentojn de sia propra potenco, bazita sur perforto.

Tiel, sendefenda viktimo de ĉiufanka subpremo, Makedonujo pli kaj pli malriĉiĝas. Okazas tio, kion ni vidas ĉie en malriĉiĝantaj terkulturregionoj (Italujo, Hungarlando, Rusujo): amase elmigras al najbarlandoj: al Bulgarujo, Serbujo, Aŭstrio. Tie la elmigrintoj vivas en pli bona situacio — ili kunportas la malamon al Turka regado; ili plifortigas la malamon de Bulgaroj kaj Serboj al la Turkoj; ili provizas kun novaj argumentoj la militaristojn kaj la militemajn partiojn inter tiuj popoloj. Por tiom ili ne elmigras, la kamparanoj estas premataj malsupren ĝis la nivelo de ĉifonmizeruloj. El tiuj sin rekrutas la bandoj da armitaj rabantoj, kiaj en historio, sub similaj cirkonstancoj, ĉie aperas.

La konkiro de Makedonujo de la Balkanŝtatoj do signifas por tiu regiono socian progreson. Tiu konkiro ja liberigas la Makedonajn kamparanojn de ekspluatado de Turkaj terposedantoj; la kamparanoj de Eta-Azio ne plu devas liveri monon kaj homojn por certigi la regadon de 15.000 terposedantoj super la submetita Makedona loĝantaro. Ke tiu ĉi, ĝis certa grado vera liberiga milito ne okazis pli frue, tio havas sian kaŭzon en la naciaj antitezoj de la Kristanaj Balkanpopoloj inter si, pro kio Balkanligo estis ĝisnun neblajo.

(Daŭrigota.)

W. N.

## Serba kulturo.

Jen aldono al la interkorespondado de franca kaj serba k-do pri serba kulturo. Mi trovis ĝin en la Wien'a laborista gazeto de la 8a januaro.

Estas ja konate, ke ĉiu konsulo de eŭropaj ŝtatoj pagas al siaj landanoj la hejmvojaĝon, ĉu persone aŭ donante al la malfeliĉulo malriĉiĝinta aŭ malsaniĝinta, la necesajn monerojn. Pli suspektemaj konsuloj transdonas nur vojaĝkarton.

Escepto faras la serba konsulo en Wien'o.

Laboristo organizita, kies nomo estas Zivojin Petrasinovic el Kraljewe en Serbujo, petis helpon ĉe li. Li donis al la laboristo fermitan leteron adresitan al la polica direkcio. Petrasinovic, kiu ŝajnas esti prudentulo, portis la leteron ne al la polico sed al la laborista gazeto. La necesan helpon li ricevis de siaj kamaradoj.

La enhavo de la dirita letero estis jena: (laŭvorte tradukita)

Reĝa serba ambasadorejo.

Z 2386. Al la laŭdatinda imperiestra reĝa polica direkcio  
Wien IX Elisabethpromenade 7.

La reĝa ambasadorejo serba sin honorigas peti plej ĝentile la imperiestran reĝan polican direkcion, ke ĝi bonvolu forigi de Wien'o la alportanton de tio, Zivojin Petrasinovic el Kraljewe en Serbujo, kaj konatigi al ĝi la kostojn kaŭzitajn per tio.

Wien'o, 30an de Dec.

Por la ambasadoro:  
(stampilo.)

Jen! Kiu ridas? Ĉu tio estas ridindaĵo? Ne, terurinda abomenaĵo! Pripensu do. Honesta laboristo petas helpon ĉe tiu, al kies devo apartenas helpado je samlandanoj kaj tiu lasas lin forpeli kiel ĉifonvestitan mizeraĉulon, kiel krimfarinton, de fremda polico!!!

Ne estas ankoraŭ ĉio.

Mi rememoras pri barbara reĝo, kiu sendis homon por ties bono al amika reĝo en alia lando kun letero enhavanta la du vortojn: Senkapigu lin.

Diferenco estas nur la kapo.

Kultura faro estas la sama.

Mi petas, franca kamarado, rakontu tion al via serba amiko, kiu signas la militon de sia lando „kultura“.

EDMONDOZ.



## SOCIA MOVADO.

### El Anglujo.

La disigo de l' eklezio de l' ŝtato nun estas certeco por la lando Kimrujo. En parlamento estis ekscitantaj okazoj, sed la projekto de leĝo sukcesis travivi la duan legadon, tial ĝi baldaŭ fariĝos leĝo. Multaj progresemluloj (parlamentaj deputitoj) nun malkaŝe parolas pri la partigo de la eklezio kaj la ŝtato tra Granda Britujo.

La feministoj ree aktiviĝas, kaj malliberiĝas; samaj taktikoj kiel en lasta raporto.

Strikoj. La faristoj de vaporujoj en Halifax malgajnis strikon post brava duonjara lukto. La scienco estis la strikrompisto: la elpensado de gaskuniĝo de la ferpladoj senlaborigis multajn homojn. La kolorigistoj laŭŝajne gajnis sian postulon post striko unu-semajna.

La ferfandistoj batalas ankoraŭ de multaj semajnoj en Heighley; feliĉe, oni estas senorganizitaj kaj esperas gajni pli da salajro.

La fervojistoj estas pardonitaj pri la monpuno (raportitaj en ĉi tiu rubriko).

La kolonioj subtenos propran mararmeon (por konservi la pacon!?)

Ka Kanceliero de la Kaso proponas la minimuman salajron al kamparuloj (farmlaboristoj) 10 Sm. po semajne pri la kosto de iliaj vivadoj, li nenion diras, ĉu li scias ke la vivkosto estas la mezuro de la salajro de la laboristaro, eble.

HOYLE.

### El Aŭstrio.

Parlamenta konsekvenco! Antaŭ unu kaj duonjaro, post forta movado de fervojistoj, proponis la soc.-demokratiaj deputitoj en Aŭstria parlamento, ke oni donu por plibonigo de fervojistaj vivkondiĉoj 62 milionojn da kronoj; malaprobinte ĉi tiun proponon, la registara plimulto el la parlamentanoj aprobis tiam nur 38 milionojn da kronoj. Ministro de fervojoj sub la preteksto „malmulte da mono“ elspezis tiam por la fervojistoj nur 21 milionoj, promesinte la restojn doni post tempo. Tion ĉi rememorigante, dum debato pri budĝeto, soc.-dem. deputito Nemeč, proponis, ke

oni erikalkulu ankoraŭ ne elpagitajn 17 milionojn da kronoj en la budĝeto. Sed kion faris la samaj deputitoj, kiuj antaŭ unu kaj duonjaro aprobis la koncernatan sumon? Malaprobis tion, kion ili jam aprobis! Ĉu oni do povas kredi al la reakcia memkonsekvenco?

Morto de batalanto por socialistaj ideoj. JOSEF ŠTEINER, unu el la plej eminentaj de la unuaj propagantoj de socialismo en komenco, kiu estis ofte arestata en katenoj sub bajonetoj de ĝendarmoj, en malliberejon kondukita, mortis. Li spite de ĉiuspecaj persekutadoj neniam malkuraĝis kaj eĉ preskaŭ sole kiel deputito en antaŭa kuria parlamento Aŭstria, batalis por homaj rajtoj.

La 31 de Dec. oni forbruligis lian kadavron — ĉi tion li, ankoraŭ viva deziris — en Zitaŭ-a krematorio. Nun li eble havos pacon: ĉar li ne plu povas timi la grandrangulojn.

Kun sincera saluto, mi restas via „VERAMA“.

### El Belgando.

Merkredon 22 Jan. komenciĝis en la Belga parlamento la debatoj pri egala kaj ĝenerala voĉrajto.

La belga soc.-demokrata popolo preparas sin, apliki sian ekonomian potencon por atingi politikan celon. La metiorganizoj opinias, ke la ĉiutaga batalo kontraŭ entreprenantoj kaj fabrikestroj, por pli bonaj laborkondiĉoj, nur estas la duono de sia tasko.

Ĉar montriĝis, ke sole grandega striko povas konverti la kontraŭulojn de egala voĉrajto, oni nun laboradas al preparo de tia striko.

Ministro De Broqueville malfermis la debatojn. Li nomis strikon: neleĝa devigilo; ĝi kaŭzas, neeviteble, atencojn je vivo kaj posedadoj; en 1891, je la unua tago de simila striko, trifoje oni uzis dinamiton (oni memoras, ke provokativisto, nomita Pourbaix, tion faris). Striko, kiu senigas socion je lumo, pano, komunikado, estas ago de perforto! ekkriis la ministro. (Vi havas en la mano la rimedon eviti tion! oni interrompis lin). Kaj, fine, venis la kutima argumento: „La lando malŝatas prokraston de sociaj leĝoj; ĝi deziras, ke ni rapidu fari sociajn leĝojn kaj ne perdu tempon pro ŝanĝo de l' konstitucio.“

Eduard Anseele tuj respondis la elvokantan kaj insultan paroladon: „Ni uzis vane ĉiujn rimedojn, do: Vivu la striko ĝenerala! Ni postulas nian rajton, kaj, responde, vi batas nin



en la vizaĝo! Sed la laboristoj donos al vi konvenan respondon! Inter vi kaj ni nenio restas krom la malbona parolado, kiun jus vi eldiris. Ni komprenas: vi havas la ambicion de l' ŝtatestoj. Tra viaj revoj iras la rememoro al viaj antaŭuloj: al Beernaert, kies estinteco estas makulita per kadavroj de laboristoj; al Smet de Naeyer, kies insignoj estas kovritaj per kadavroj de laboristoj; al De Trooz, kies rememoro estas malpurigita per kadavroj de laboristoj; al Berryer, via nuna kolego, kies konscienco estas ŝarĝita kun kadavroj de laboristoj. Tiu honoro ankoraŭ mankas al vi! Vi komprenas, ke ĝi fiksos vian famon en la alta mondo, se tie vi povas aperi kiel foŭtulo, kiu je la laboristoj triumfis per pafiloj."

"Kion vi diris pri la perforta karaktero de l' striko politika, tio avertas nin kien vi intencas konduki la aferojn. Sed, malgraŭ viaj penoj, nia movado ne aplikos perfortaĵojn. Ni zorgplene mankiĝos al vi la treege deziratan pretekston por povi dronigi la strikon en sango. Vi havos nenium je kiu vi povos pafigi; nenium, kiun vi povos jeti en malliberejon... Vi diras, ke vi ne lasas inilui vin per minacoj? Kaj antaŭ unu semajno vi deziris egan pligrandigon de militarismo, ĉar, vi diris, nia nedependeco estas minacata! Por ŝirmi vian landon, vi prenas nian monon kaj niajn infanojn por via armeo, sed vi ne kuraĝas postuli de la posedantoj, ke ili cedu sian plioblajn voĉojn!

"Ni igos suferi la laboristojn, vi diras. Vi krias tion je la sama momento je kiu vi postulas la sangon de l' tuta popolo por la milito — samtempe vi plendas ĝin, ke ĝi volas fari oferojn por sia propra afero! La laboristoj respondos vin, ke ili en via socio jam kutimadis malsati; ke ĉiutaga suferado kaj konstanta danĝero de vivo estas ordinara afero por ili. Maristo, ministro, fabriklaboristo — ili ĉiuj riskas ĉiuhore la vivon dum sia laboro, kiu riĉigas vin. Ĉu ili ne estus pretaj interrompi laboron dum kelkaj semajnoj, por finigi unu el viaj hontindaj privilegioj? . . . Neniam mi tiom ĝojis kiom nun, ke mi apartenas al la laboranta popolo, kiun vi insultas. Ni akceptas la novan elvokon . . . Kamaradoj, laboristoj, la posedantoj vin batas denove en la vizaĝo, ili ree traktas vin kiel forjetinduloj, kiel nevalorantoj . . . Vivu la striko ĝenerala!"

W. N.

### El Franclando.

Senpera ago. (Daŭrigo). Pli kompreneble, la batalo fariĝis per la formoj de l' „senpera ago“ celas plifortikigi la

laboristan klason, senfortigi ĝiajn kontraŭulojn; ĝi ne havas kiel objekton, la nuran ekzercon de la perforteco. Oni do ne povas, sen malbona fido, konfuzi la batalon kaj la akcidenton; ili sin kunligas, certe, ili ne estas malkunigeblaj; la batalo ne estante ĉiam trankvila aŭ ĉiam perforta.

Se niaj kontraŭuloj estus pravaj, sekve la perforteco estante la ago mem, la brutulo, kiu ĉe la turno de la strato mortigas la pasanton, estus adepto de la sindikatanaj teorioj, ĉar li uzus la perfortecon, almontrus sian krudan fortecon.

La valoro de la „senpera ago“ sin apogas sur tio, ke ĝi postulas ke naskiĝu inter homoj, gvidataj de la samaj bezonoj, solidarecaj ligiloj, cele plikreskigi ilian forton permesantan pezi pli forte sur iliaj kontraŭuloj. Ĝi sin apogas ankaŭ sur tio, ke ĝi necesigas de l' proletario, personan penon plialtigantan lin super li mem kaj sentigantan al li la mallarĝan komunecon de intereso, kiu ligas lin al liaj kamaradoj ekspluatatoj.

Pli altigante lin, la „senpera ago“ ebligas al li ekvidi la amplekson de l' problemoj devantaj, en la daŭro de la batalo, sin prezenti antaŭ lia spirito, kaj komprenigi al li la meĥanikismon de l' ofico de salajrato: ofico havanta kiel celon, garanti senĉesan malvolvigadon, kaj senhaltajn progresojn ĉe l' evoluado de la socioj.

De tiuj socioj la proletario estas konsistiganta ero; la problemoj estas do, certigi al li, la direktadon de tiuj progresoj kaj la ĝuon de tiuj bonoj.

Por ke estu tiel, sindikatismo certigas la necesecon de pli grava produktado kun malpli grava peno; tiu rezultato povas esti atingata nur per pli bona tekniko kaj per utiligo pli bone aranĝita de l' sociaj riĉaĵoj.

Trad. A. PANLOU.

### El Nederlando.

Unu el la plej malsanigaj kaj plej malbone pagataj metioj estas, ĉe ni, tiu de l' tabakindustrio. Tiu metio estas turmentata unuflanke de tuberkulozo kaj venenado per nikotino, aliflanke de hejmindustrio, laboro de virinoj kaj infanoj, kun siaj kutimaj sekvoj: malaltaj perlaboroj, senfinaj iabortagoj, ĉiuspeca mizero. La laboristoj el tiu metio postulas nun iom malpli malbonajn laborkondiĉojn. La fortege organizitaj entreprenantoj respondas per tia elŝoso, kian Holando ĝis nun ne ankoraŭ vidis. Sed la cetera proletariaro kontraŭmetos solidarecon, oferecon, kian Holando ne vidis ankoraŭ. La



elŝloso estas proklamita por preskaŭ la tuta lando kaj trafos 5000 laboristojn.

La tipograflista striko en Amsterdam finiĝis kun venko preskaŭ kompleta.

W. N.

### El Rumanujo.

6 Febr. rumana soc. partio festis en sia Bukureŝta klubejo la datrevenon de la renaskiĝo de la socialista movado en Rumanujo. K-do Frimu, unu el la plej konstantaj kaj sinceraj batalantoj, paroladis pri la evoluado de la socialista movado en nia lando; k dino D-rino Ecaterina Arbore (filino de besarabia ekzilito en Siberio, de kie li rifuĝis en Rumanujo) parolis pri la rusa revolucio.

Mi profitas tiun-ĉi okazon, por montri al la tutmonda kamaradaro, ion el la historio de socialismo en Rumanujo.

Mi diris supre, ke oni festis renaskiĝon de socilista movado. Oni devas scii, ke tiu ĉi movado en nia lando dividiĝas en en la malnova kaj nova movado.

La naskiĝo kaj la renaskiĝo de socialista movado en Rumanujo estas ŝuldata en la plej granda parto al la rusa movado.

Efektive, antaŭ preskaŭ 35 jaroj, D-ro Russel, poste forpelita el Rumanujo kaj nun troviĝanta en Aŭstralio, kun k-do C. Dobroĝeanu-Ghereo, fama literaturisto kaj kritikisto, ambaŭ forkurintaj el Siberio, kien ili estis ekzilitaj, kaj D-ro Zulkucodreanu, kiu peradis la enkondukon en Rusujo de socialistaj libroj presitaj en Londono kaj Genevo, komencis diskonigi la socialistajn ideojn en Rumanujo. Tuj aliĝis multaj junaj intelektuloj, precipe studentoj, kaj, malgraŭ ĉiaj persekutadoj, la areto grandiĝis kaj la movado kreskis, enkalkulinte multajn klerajn oratorojn kaj laboristojn.

En multaj okazoj la tiama soc. partio forte kaj sukcese batalis. Kelkaj gazetoj aperis, semajne, dufoje semajne kaj poste eĉ ĉiutage. Por pli granda sukceso oni komencis eĉ kampanan movadon kaj multaj klubejoj kampanaj ekfundiĝis. Tiu paŝo estis la plej granda sukceso, kiun ĝi atingis tiutempe, sed kiu, bedaŭrinde, kaŭzis la falon de la movado. Oni donas kiel kaŭzon de tiu katastrofo la fakto, ke la laboristaro en la urboj ne estis organizita. Sed ĝi falis ankaŭ pro tio, ke la plej entuziasmaj kaj fervoraj, kleruloj precipe, perfidis la movadon kaj sub diversaj kaŝaj motivoj enskribiĝis en la liberala partio, la plej reakcia kaj abomena

partio, kiu ĉiam persekutadis sovaĝe la socialistaron, per la plej malindaj rimedoj; malliberigante senkaŭze, ekzilante multajn rumanajn kamaradojn — pli ol mil, inter kiuj ankaŭ k-do D-ro Racovski, kiu ne volis akcepti la proponon perfidi la laboristan movadon — voĉdonante leĝojn kontraŭ la laboristoj, ekz. la leĝo kontraŭ asociiĝo, mortigante pli ol 11000 kampanojn okaze de la 1907-ribeo (frukto de ĝia agado), starigante ĝendarmojn en ĉiuj vilaĝoj, k.t.p.

Tiu katastrofo, okazinta dum jaro 1899—1900, pli kaj pli vastiĝis kaj ĉirkaŭ la ruĝa standardo restis nur kelkaj pli konvinkitaj kaj konsciaj kamaradoj, kiuj vane klopodegis restarigi la movadon, ili ne sukcesis ĉar estinte nur junaj ne povis influ sur la amaso.

Tiel finiĝis la malnova movado, kies postsignoj ankaŭ nun sentiĝis, ĉar la perfidintoj fariĝis la plej reakciaj persekutantoj de la socialistoj.

Ĉirkaŭ ses jaroj la movado estis preskaŭ mortinta. La areto sentis sin senpotenca entrepreni ion. Nur dank' al la rusa revolucio, komence de 1905, la movado renaskiĝis. Entuziasmigitaj de tiu revolucio, la areto por konformiĝi al la alvoko, kiun la internacia ofico soc. faris al ĉiuj socialistoj por protesti kontraŭ la rusa registaro, kuraĝiĝis kaj, kvankam ili sciis ke la polico malhelpos ilin, pensante ke se okazu kio ajn, ili devas fari la devon, kunvokis publikan kunvenon, kiu okazis la 9 (22an) de Januaro 1905 en la plej granda salonego. Kiel oni antaŭvidis, tio ja okazis. La polico volis malebligi la okazon de la kunveno kaj naskiĝis granda skandalo inter la policistoj kaj organizintoj, tiel ke la bruo altiris la publikon, kiu amasiĝis grandare. Post protestado energia antaŭ la polica prefekto mem, la kunveno estis permesita kaj tiel ĝi povis okazi. Tio igis la gazeton multe priskribi, atentiginte multajn kamaradojn, kiuj nenion sciis plu pri tiu areto.

Unu el tiuj, kiujn vekis tiu kunveno estis ankaŭ la senlacega batalanto D-ro Racovski. Tuj post legado de tiuj sciigoj, kvankam loĝante en vilaĝo apud Constantza (Dobroĝa), per la unua vagonaro li estis en Bukuresti, kie li interkonsiliĝis kun la aretanoj por rekomenco de l' movado.

Tiel renaskiĝis la socialista movado en Rumanujo, dank' al la rusa revolucio kaj al la policistaro, kiu provokis la skandalon.

La nova movado komencis per starigo de laboristaj sindi-



katoj, kiuj kalkulas nun pli ol 15000 membrojn kaj dum Februaro 1910 refondiĝis la social-demokrata partio.

Kompreneble, la movado estas ankoraŭ nesufiĉe forta, sed ĝi progresadas. Tion atestas la plimultigo de la membroj kaj la sukceso, kiun ĝi havis en multaj okazoj por kiuj ĝi devis batali.

Per la repatriigo de D-ro Racovski, la movado gajnis multe kaj ne estas malproksima la tempo kiam ĝi povos havi pli da sukceso en la batalo por la sankta idealo.

EM. I. NICOLAV.

### El Rusujo.

Holanda sinjoro, J. I. de Haan, komunikas en burĝa revuo „Movado”, ke li vizitis Rusujon kaj sukcesis penetri en kelkaj malliberejoj; li parolis kun juna politika malliberulo, kiu antaŭe estis komercmaristo.

Ili parolis angle, kaj la kondukanto, neniom komprenante, foriris por kelkaj momentoj. La malliberulo diris i. e.: „Estas milito inter rusa popolo kaj rusa regnestro. Nuntempe popolo konstante malvenkas, sed fine popolo triumfos. Por mi vi ne bezonas ion fari, sed vi faru ion por ni ĉiuj. . . . vi diru en via lando, ke la rusaj regnestroj estas la plej abomenaj mortigantoj en la tuta mondo. . . . ke ili mortpafis eĉ lernejinfanojn, fi-traktas eĉ geknabojn, kaj ĉiam ĝin faros denove, se ili restas en potenco.” Je tiu momento revenis la kondukanto; evidente komprenante la temon traktitan, li admonis: „Tiu viro estas granda krimulo. . . . revoluciulo; ili volas bombmortigi la caron. Al vi li sendube rakontis mensogojn, ĉar ili ĉiuj ĉiam mensogas, por instigi kontraŭ ni aliajn popolojn.”

Sinj. de Haan plie rakontas pri letero, sekrete sendita al li el malliberejo. La skribinto diras, ke alta oficisto, kiu gvidis la vizitanton tra la malliberejo, estis dirinta al la malliberuloj: „Ni permesas al vi paroli kun tiu vizitonto, sed, se li poste rakontas en Eŭropo malbonaĵojn pri tiu ĉi malliberejo, tio havos por vi sendube gravajn sekvojn.” Tiu sama oficisto donis al sinjoro de Haan sian parolon de honoro, ke neniu malliberulo suferus iun malagrablaĵon pro komunikoj al li! Jen kiom valoras parolo de honoro de rusaj oficistoj!

W. N.

Por kontraŭbatali arogantan konduton de niaj malgrand-burĝaj agantoj, ni eldonis neantaŭlonge broŝuron: „Forgesita

estlanda urbo”, preparolanta la mizeran staton de laboristaro en Narva. La broŝuro havis plenan sukceson. Sed ĝian disvastigon malhelpis la polico, kiu, malgraŭ tio, ke broŝuro estis permesita de cenzuro, persekutadis kaj punadis, kune kun administracioj de fabrikoj, la disvastigantojn. Kelkajn el ili estas traserĉitaj, arestitaj kaj al du el ili, per administracia ordono, estas malpermesita transiri la limojn de antaŭurbo, kie ili loĝas. Krom tio, ni komencis eldoni semajnan gazeton: „La Radio”, kiu nun havas preskaŭ trimil legantojn. Baldaŭ ĝi komencos eliradi ĉu ĉiutage, ĉu trifoje en semajno. Ĝi estas redaktata en marxista spirito, kia gazeto en Estujo tute mankis ĝis nun. Ni komencis eldonadon preskaŭ sen kapitalo, nur kelkdeke da Sm. ni havis. Vere, nia historio estas mirinda. El tio oni povas vidi, ke la laboristoj ĉiam, kaj ĉie, se ili nur volas, povas multe fari, eĉ en Rusujo. Same mi opinias, ke por I. S. R. estas tute ĝustatempe fariĝi dusemajna, kaj en proksima tempo eĉ — semajna gazeto. Nur, kamaradoj, ĉiu el ni devas ĝin laŭpove helpi.

LA AKTIVULO.

(Momente red. de I. S. R. posedas dekonda grandaj, tre gravaj artikoloj el Rusujo! Kion fari! Kaj el diversaj aliaj landoj tiom! Sufiĉe por pli ol unu jaro! Kaj kelkaj k-doj koleriĝas, se ilia artikolo ne tuj estas presata!)

Laŭ la gazetaj sciigoj mi scias, ke en Rusujo antaŭ kelkaj semajnoj estis pendigataj 16 maristoj; en tiuj urboj laboristoj protestis per striko kontraŭ tiu maljusta barbara ekzekuto.

La 9/22 de Jan., dato neforgesebla de cara perfido, kiam 1905 j. samdate estis pafata multmila laborista amaso — rusa laboristaro ankaŭ strikis.

En Rusujo pro 300-jara regado de dinastio Romanov, oni intencas proklami amnestion al kelkaj politikaj malliberuloj. Ĉu ne estas ridinda ĉi tiu cara favoro kaj grandanimeco? Oni liberigas la kamaradojn por post kelka tempo ilin denove enkatenigi aŭ pendigi. Cara amnestio! Kia ironio! Tirano-aŭtokrato montras sian grandaniman favoron al siaj malamikoj. Kiam homaj suferoj estas antaŭ la okuloj — oni kompatas kaj iafoje eĉ estas pretaj sindone helpi al la suferantoj, sed se oni suferas ie malproksime, aŭ post altaj malliberejaj muroj, aŭ en ekzilejoj, aŭ en la katorgoj, de kie la ĝemoj ne estas aŭdataj — oni facile kaj baldaŭ forgesas la suferulojn kaj estas pri ili tute indiferentaj. Ĉu ni, liberaj homoj, povas al ni bone prezenti tutan inferon, en kiu suferadas niaj plej bonegaj gekamaradoj, tiun atmosferon, kie sola rimedo de



batalo estas... memmortigo! Kaj kion do ni faras, ni, liberaj homoj, ĝuantaj la helan sunon, freŝan aeron, gekamaradan kun eston? Ni malmulte faris, kaj jen, cara fi-amnestio venis pli baldaŭ ol nia helpo. Sed tiu fi-amnestio ne plibonigos ja la aferon! Ĉiuj ĉi caraj favoroj estas nur paliativoj senutilaj kaj fiĝrandanimaj agoj; ja amnestio ne garantias, ke en katorgoj oni ne plu suferados, en la ekzilejoj oni ne plu malsatados, kaj homoj estos liberaj! Do, ne cara favoro, sed nur ni, homoj, forigos kaj ekstermos la katorgojn kaj aliajn suferejojn, kaj rekonstruos la vivon. Tion ni atingos nur per batalo, al kiu ni donu tutajn niajn fortojn.

En la nomoj de miloj da gekamaradoj, tiaj sanktaj viktimoj, ni alvokas vin al la batalo, karaj gekamaradoj!

EKSEKLEZIANO.

### El Nova Zelando.

12 Nov. 1912, strikrompantoj, ŝirmataj de regimento da policanoj, eniris perforte en Waihi (ormina distrikto) la kunvenejon de l' ministroj. Kvin strikantoj penis ĝin defendi. Ili vundis per revolverpafoj unu policanon kaj unu „skabon“ (strikrompanto). La policanoj mortbatis unu strikanton, Evans. La skaboj frenezigis kaj atakis ĉiun strikanton, kiun ili povis trovi. Oni alportis la korpon de nia k-do Evans al Auckland, kaj je la sekvanta dimanĉo, 3000 k-do, kvarope, lin sekvis al la enterigejo. Estis la plej granda simpatia funebro iam vidita en Nova Zelando. Neniam ni forgesos ĝin.

29-XI-'12. La strikantoj, cedante al la kapitalista perforto, deklaris la strikon finita.

C. H. PARKER.

### Pri kolonio en Brazilujo.

Je la momento kiam oni propagandas por elmigrigi laboristojn, estas necese konigi al ĉiuj la jenajn liniojn eltiritajn el „La Barricada“ de San-Paolo, kiu petas la liberan gazetaron Eŭropan enpresi.

„La ĉasado kontraŭ la fremdaj laboristoj komenciĝas en la ŝtato de San-Paolo. En la ĉefurbo de San-Paolo sekretaj policanoj (ŝtatarmeo da rabistoj, ŝtelistoj, mortigistoj, dungitaj por fari la terurajn perfortojn kontraŭ la laborista klaso) rabas ĉiutage en ĉiuj kvartaloj de la urbo, kaj polico surdigas la protestojn. La leĝoj kaj la konstitucio de respubliko estas piedpremitaj de l' polico, la ordonoj de juĝistoj ne estas respektataj kaj la rajtoj kaj la indeco de la fremduloj dependas de la volo de la inkviziciistoj.

La laboristoj fremdaj — dungitaj de la agentoj de brazila registaro en ĉiuj Eŭropaj landoj kaj bonege pagitaj por altiri la blankulojn por sklavado en la fazendas — havas neniujn rajtojn, eĉ ne la rajton je la salajro. Kaj tre ofte kiam ili postulas sian perlaboron, iliaj ŝtelmastroj denuncas ilin al polico kiel anarkiistoj, kaj polico malliberigas ilin tuj poste!

La laboristoj, kiuj postulas justecon, ĉiam malgajnas, ĉar por sklavoj de la caciques de Brazilujo ne ekzistas justeco.

Tamen, la fremdaj laboristoj — dungitaj de la agentoj registaraj per mensogaj promesoj — petas malmulte al siaj mastroj:

1e. Respekto de respublika konstitucio kiu permesas la samajn rajtojn al ĉiuj, fremdaj aŭ naciaj laboristoj; 2e garantio de la salajroj; 3e rajto pri laborista organizo; 4e garantio pri la vivo de la laboristoj kaj deviga asekuro kontraŭ akcidentoj; 5e regularo de la laborkondiĉoj de virinoj kaj infanoj en industrio.

Nune, la laboristoj ne ĝuas ian ajn garantion, nek pri vivo, nek pri libereco.

En la fazendas la kolonistoj havas neniun rajton de l' moderna civilizacio; nek ekzistas lernejoj, nek kuracistoj, nek farmaciistoj. La blankaj sklavoj nur valoras homan brutaron, ekster la leĝoj civilizitaj. La kamparanoj hispanaj kaj italaj anstataŭis la nigrajn sklavojn!

Gelaboristoj! Mizerfratoj! konkludu la alvokon, ne aŭskultu la agentojn de la sklavistoj, kiuj nur konas Brazilujon per ĉampanvino donacita de la registaro. Ili skizas Brazilujon kiel surteran paradizon, tial ke ili estas pagataj por tion fari.

Laboristaj kaj kamparanoj Eŭropaj: ne venu Brazilujon, lando kie la laboristoj estas sklavoj kaj kie ne ekzistas kompato pri virinoj aŭ infanoj”.

Tradukita el la Franca „Sindikata Batalado“ de la 9a Februaro 1913.

K-do Strasser skribis en Februaro-no.: informiĝu ĉe ŝtataj oficialaj oficejoj; mi diras al estontaj Braziloj: informiĝu direkte, senpere, kaj per braziliĝa laborista gazetaro kaj tie, tie nur, vi ekscios verajn fidindajn informojn.

T. S., el „Liberiga Stelo“.

### La E.S.F.I.O.

Kunsido de 16/II/13. La protokolo de la antaŭa kunveno estas aprobita. Letero estos sendata al Pierre Loti, por lin



gratuli pro liaj kuraĝaj skribajaj fervoraj je la Turkoj. (En Francujo la burĝaro estas, ĝenerale, kontraŭ-turka. Red.) Ni klopodos plie por atingi la membrojn la Grupo Parla-menta Socialista kaj la redaktorojn de l' „Humanité”. Pri la afero Cacouault protestletero estos sendata al l' „Humanité”, „I. S. R.” kaj „Le Travailleur Espérantiste”. La kamaradoj raportas pri la paroladoj faritaj en Bagneux, Amiens kaj Sainte Avoye; en Amiens ĉeestis 200 personoj sub la prezidanteco de Lecointe, deputato de Amiens, tre fervora al nia afero. Ni organizos paroladojn en Bercy kaj Croulebarbe.

En tiu momento alvenas telegramo esperantista el la Laborista Esperantista Grupo de Breslau, kiu sendas siajn fratajn salutojn.

La respondo de Panlou entenas erarojn, kiujn ni korektos post interparolo kun A. Dunois, redaktoro de l' „Humanité”.

La proksima kunveno okazos dimanĉe 16 Marto, je 9a matene, en Maison Commune du 3e, 49, rue de Bretagne. Ĝi decidos ĉu Esfio sendos delegiton ĉe la 2a kongreso esperantista laborista Germana, en Frankfurt a. M.

Al s-ro Pierre Loti, membro de l' Franca Akademio. — La Esfio, post paroladoj de du kamaradoj, kiuj loĝis dum kelkaj jaroj en Turkujo, decidis sendi al vi siajn respektplenajn gratulojn por viaj kuraĝaj skribajaj favoraj al la Turkoj.

## NOVAĴOJ DE ĈIE.

Piŝen, Bohemujo. — Kvankam en nia preskaŭ naŭdek-mila kaj pro biero fame(?) konata urbo ekzistas Esperantistoj, oni ĝis nun pri ili nenion legis en nia „Revuo”. Tial mi plenumos la taskon, aŭdigi gekamaradojn pri ĉi tiea movado.

Ĉi tie ekzistas jam de kelkaj jaroj burĝa klubo, apartenanta al „Bohema Unio Esperantista”. Ĉar ĉi tiu klubo ne povis penetri inter la laboristaro, tial ĝi apenaŭ estis kapabla ekzisti. Tion vidante, kelkaj pli progresemaj anoj de la klubo, kun kelkaj laboristoj, penis fondi ĉi tie „Lab. grupon Esp.” de „Lab. Asocio Esp.” en Praha, antaŭ unu jaro fondita. Tio plene sukcesis.

Nun ekzistas ĉi tie, krom la burĝa klubo, 2 laboristaj grupoj en la urbo kaj en malgranda antaŭurbeto Letna, kune kun pli ol 100 membroj. Nun estas aranĝitaj du kursoj elementaj kaj unu pli supera en kiuj plejmulte instruadas nia oferema kamarado Tyll.

14 Nov. okazis ĉi tie festeno de ĉiuj esperantistoj el tuta urbo, je 25 jara jubileo de Esperanto kaj je 53 jara aĝo de la majstro. Ĉeestis preskaŭ 400 homoj. Dum la festeno faris maljuna protagonisto de nia afero, s-ro Baték, ekslernejestro el Ričany, entuziasman paroladon „Pri historio kaj evolucio de Esperanto”, kiu multe efikis al la ĉeestantoj.

VERAMA.

Antverpeno, Belgujo. — En Septembra numero la redakcio bedaŭras, ke en multaj landoj I. S. Revuo ne ankoraŭ estas penetrinta; inter ili li nomas ankaŭ Belgion. Nun mi estas feliĉa, ke mi povas sciigi, ke mi de nun estas abonanto kaj mi sendos la abonmonon la 1a de Jan. 1913. Ankaŭ mi promesas, sendi ĉiujn novaĵojn pri socialista movado en Belgujo, kaj mi penados, trovi legantojn por I. S. R., kvankam en Antverpeno socialistaj Esperantistoj ne estas multnombraj. Fratajn salutojn al Int. Socialista esperantistaro. D. H. SALOMON, Lange Nieuwstraat 15, Antwerpen, Belgio. Deziras ankaŭ korespondi kun socialdemokratoj.

(Depost novjaro I. S. R. trovis agenton en Liège kaj Bruxelles — en ambaŭ urboj, alilanda k-do, tien transloginta, konatigis nian organon; tuja rezulto: 16 abonantoj.)

Barcelono, Hispanlando. — La Dimanĉo 17a de Novembro vespere, la racionalista profesoro Manuelo Badia donis konferencan pri „Graveco de la racionala instruado” en la masonista societo de la Gracia kvartalo. La salono ne sufiĉis por enhavi ĉiujn la gekamaradojn, kiuj venis por aŭskulti la konferencanton, tamen ili silente atentis la klarajn pruvojn de supereco, kiujn montris tiu profesoro, dum li komparis la racionalan instruadon kun la ŝtata kaj religia instruado. Ankaŭ ĉeestis en tiu konferenco iuj gesamideanoj, kiuj disdonis esperantajn broŝuretojn „Pro Esperanto” al la aŭdantaro. La supredirita profesoro ankaŭ promesis lerni esperantan lingvon.

J. PAULET.

Zürich, Svisujo. — La jus fondita „Laborista Esperanto Grupo” deziras ricevi ĉiujn ajn dokumentojn, propagandilojn, poŝtkartojn k.c., koncernantajn Esperanton inter la laboristaro. Oni bonvolu adresi sendaĵojn jene: Laborista Esperanto Grupo en „Pomona”, Neumarkt, Zürich I.

Esperanto-gazetoj samcelaj estas petataj represi ĉi tiun avokon. Por la grupo: Karl Jost.

Bilbao, Hispanujo. Grupo Socialista Esperantista,



Strato Ascao 3—3. Tiu ĉi societo de la komenco de nuna jaro aranĝas kursojn, paroladojn, festojn k.t.p. Konsistas proksimume el 70 membroj. En la monato Januaro okazis ĝenerala kunveno por balotado de la estraro dum 1913. Estas elektita prezidanto Juan Gracia kaj sekretario L. Markaida.

Lyon, Franclando. De ses monatoj ekzistas en Lyon Grupo Esperantista Laborista. Tiu grupo tre bone sukcesas. Ĝi havas nun 25 anojn. En Novembro ĝi volis malfermi unu kurson. Sed la lernantoj estis tiel multaj (50) ke ĝi malfermis du kursojn anstataŭ unu. La grupo estas aliĝinta al „Liberiga Stelo” kaj nun kvin el ĝiaj anoj estas abonantoj al I. S. R. kaj dekkvin al „Le Travailleur Espérantiste” (La Esperantista Laboristo). Por la grupo sin turni al la sekretario: Marcel Gouchon, 3 rue Paul Bert, Lyon (Franclando).

Esperantaj glumarkoj! La Laborista Grupo en Reichenberg (Bohemujo) eldonis belegajn glumarkojn en ses diversaj specoj por propagandi nian lingvon precipe inter la preslaboristaro. Ili kostas po 100 K. 1.10 = Sm. 0.46 kaj estas mendebla ĉe s-ro Gustav. I. Ulbrich, Alt-Harzdorf 69, Reichenberg (Bohemujo). Specimenoj estas riceveblaj nur kontraŭ respondkupono.

## ESPERANTA MOVADO.

La neceso havi komunan lingvon por internaciaj socialistaj kongresoj estas forte montrita de la raporto de angia delegito al la kongreso en Basle. Ŝi raportis: „... La angla delegacio kunvenis por unuafoje pridiskuti la rezolucion, kiu estis nur parte tradukita el la germana lingvo. Nenece diri, ke la plejmulto de la angla delegacio post la kunveno malmulte komprenis la enhavon kaj signifon de la manifesto. Estis neniu oficiala tradukisto, kaj ni, kiuj parolis germane, devis fini la tradukadon. Mi volonte tion faris dimanĉon, sed forte malplaĉis al mi fari tradukadon lundonmatene dum la tute tro mallonga kunsido de la kongreso. ... Fine Jaurès legis ĝin en la franca lingvo, Adler en la germana kaj Keir Hardie faris sinoptikan rezumadon en la angla lingvo.”

Pensu! ke delegitoj akceptas gravan manifeston, kiun la plejmulto el ili eĉ ne legis, nek aŭdis en sia propra lingvo!

Kelkaj anoj de B.L.E.S. profitis je la okazo prezentita de

ĉi tiu raporto por skribi al la ĵurnalo, en kiu ĝi aperis, la „Daily Herald” rekomendante: 1. Komunan lingvon; 2. Esperanton. Estus interese kaj precipe utile, se alilandaj kamaradoj sciigus, ĉu aliaj delegitoj plendis aŭ pri manko de sufiĉe da ekzempleroj (la britoj havis nur du) de la manifesto, aŭ pri manko de tradukado. Se jes, mi petas, ke oni sciigu min, por ke mi povu uzi la sciigon por propagandi.

Kun koraj salutoj kaj bondeziroj, via frate

H. FRYER.

Al la tutmonda Esperantistaro! — Inter la multnombraj internaciaj kongresoj kaj festoj okazontaj dum la Universala Ekspozicio en Gent (Gand) 1913 troviĝas la Internacia Esperantista Semajno-Kongreso, kiu okazos en Gent (Gand) dum Aŭgusto 1913.

Tiu esperanta semajno ne estos kongreso, sed nur esperantista manifestacio, kies programo konsistos precipe el prezentado de teatraĵoj en Esperanto, koncertoj, festoj, k.t.p. kaj nur unu ĝenerala labora kunsido havos lokon kaj la nura pritraktota temo estos „Kiu estas la plej bonaj rimedoj por propagandi la Esperantan Lingvon”.

Por doni al tiu manifestacio, la plej grandiozan efikon kaj ankaŭ por progresigi la propagandon de Esperanto, la organiza komitato decidis inviti siajn samideanojn de Belgujo kaj aliaj landoj partopreni en tiu tutmonda manifestacio.

La prezo de la kongreskarto estas Fr. 2.50, Sm. 1.000: ĝi estas havebla ĉe s-ro J. Barke-De Kneef, Kerkstraat 123, Gentbrugge, Belgujo.

N.B. Por ke ĉiuj esperantistoj povu kunhelpi je la sukceso de la Internacia Esperantista Semajno-Kongreso, la samideanoj, al kiuj la ĉeestado ne estos ebla, povas enskribigi sin kiel helpkongresanoj. La kotizajo estas la sama kun samaj rajtoj (t. e. ricevo senpaga de la raporto, kongreslibro k.t.p.)

Propagando por Esperanto. — Ni ofte povis rimarki, ke la plej bona kaj plej konvinkanta impresoj estis atingata, se ni fordonis esperantajn katalogojn aŭ prezarojn de gravegaj firmoj al la koncernantoj, ne konsiderinte, ĉu ili komprenas Esperanton aŭ ne.

Nun multaj samideanoj volonte farus propagandon por nia movado, sed ili ne scias, laŭ kia maniero; ĉi tie nun estas plej bona okazo.

Ni sendos al ĉiu ajn, kiu promesas fordoni ilin konsciencie, nombron da esperantaj katalogoj, prezaroj, prospektoj de



diversaj entreprenoj, gvidlibroj de urboj, k.t.p. nur estas necese: sciigo de preciza kaj legebla adreso kaj aldonado de sendmono por paketo da 5 kilogramoj.

*Virtemberga Esperanto-Instituto.*

Esslingen am Neckar (Germanujo).

### Socialista literaturo.

En Holando, kaj sendube en multaj aliaj landoj, miloj da homoj, ankaŭ amasoj da laboristoj, lernas fremdajn lingvojn. La rezulto de tio ne estas brilanta. Sed la ĝenerala malsukceso de tiu lingvostudado ne estas sufiĉa motivo por ĉesi ĝin — ĉiam sin prezentas novaj amasoj da viktimoj. En Amsterdam, je tiu ĉi momento, almenaŭ 30.000 personoj estas studentaj germanan, anglan aŭ francan lingvon!

Tamen, ĉe ni neniu faras propagandon por tiuj lingvoj. Oni neniam aŭdas pri kunvenoj kun la temo: La utilo de l' franca lingvo. Al nenies cerbo venas eĉ ombro de penso, aranĝi ekspozicion por la germana lingvo. Ne ekzistas ĉe ni eĉ unu societo, grupo aŭ klubo por disvastigi la anglan, francan aŭ germanan lingvon. En neniu tag- aŭ kiu ajn alia gazeto estas rubriko: Kion devas ni fari por disvastigi tiun aŭ tiun naturan lingvon.

Sed, miloj kaj miloj deziras lerni la lingvojn nomitajn. Por tio oni ofertas kun ĝojo multe da tempo, multe da mono. Oni akceptas kun kvieta rezigno multe da malagrablaĵoj. Ekzemple, dum la unua jaro de l' senfina studado de l' franca lingvo, oni senlace lacigas sin per neniam sukcesontaj klopodoj paroli korekte tra la nazo. Tiuj, kiuj lernas la anglan lingvon, kuraĝe kontinuas la senesperan penon paroli ekster la buŝo, same kiel la germanlingvemuloj fervore klopodas vindi la langon en formo de ŝraŭbo kaj ssss-i je komenco, mezo kaj fino de ĉiu vorto.

Kial tiuj oferoj kaj penoj, plej ofte por nenio?

La sola kaŭzo estas, ke tiuj lingvoj propagandas sin mem. Ili sin propagandas per la spiritaj riĉaĵoj, kiujn ili metas je dispono de siaj sciantoj. Same kiel la bestoj kun peito allogas la rusan ĉasiston en la senfinajn neĝo-regionojn de Alt-Siberio; same kiel la kaŭĉuko igas Eŭropajn aventurulojn elmeti sin al la brula ardego de l' Afriko suno; same kiel la nigra oro mal-suprenigas armeojn da ministoj en la intestino del' tero — same tiel allogas tiuj lingvoj amasojn da homoj al si: per siaj trezoroj, per la praktika utilo, kiun ili prezentas kaj certigas.

Tio estas por ni signo, en kiun direkton ni devas labori por la sukceso de nia lingvo Esperanto. Se ĝi prezentos uzeblajn, *nenie alie troveblajn*, tiam oni venos amase al Esperanto. Intertempe, ni ne malzorgu la aliajn rimedojn de propagando, sed antaŭ ĉio ni kreu la situacion, ke niaj kamaradoj diros: Mi tute ne ŝatas tiun faritan lingvon, mi ĝin trovas malbela, ĝi estas por mi kvazaŭ ligna ĉevalo, mi mal-amas ĝin — sed ĝi prezentas tiom, ke estus sensecaĵo ne lerni ĝin.

Nu, tiun situacion ni povus estigi per kreo de socialista literaturo en Esperanto. Komencante per tradukajoj, kontinue ante per aĵoj originaj, ni progresu — laŭ la belega formulo de nia fratorgano „Kulturo”, — de libreto al libro, de libro al libreto, de librego al libraro!

Kiel ni tion povos akceli? Kiu havas proponojn? W. N.

### KORESPONDADO.

**Rusujo:** K-do L. Boĉkovskij, Staraja 7, Umanj, Kiev gub.: kor. en Esperanta, Ukraina, Pola, Rusa, Franca, Germana lingvoj; interŝanĝas pk. kaj poŝtmarkojn.

**Hispanujo:** K-do V. Bagan, str. Prim 101, Tarrasa; pri diversaj temoj. — K-do S. Sallarès, str. Pantano 7, Tarrasa; pri la vivo en anarĥio. — K-do E. Seuba, str. Paz 7, Tarrasa; pri turismaj aferoj.

**Francujo:** K-do J. Mariette, Hennebont (Morbihan), dez. interk. kun gek-doj el Danujo, Norvegujo, Svedujo, Finnlando, pri kooperativo kaj anti-alkoholismo. Li demandas ĉu troviĝas pri tiuj temoj libroj, esperante, france aŭ angle verkitaĵoj — Kun ĉiulandaj gek-doj: Garçon, 27 rue Lesage, Parizo (20e). — Demoulin, 33 rue de la Mare, Parizo. — E. Darras, 60 Bd. de Belleville, Parizo. — R. Barguès, 5 rue Caillié, Parizo (18e). — L. Aránaga, 5 rue Caillié, Parizo (18e).

**Germanujo:** K-do Willy Biatas, fornisto, Securiusstr. 24, Delitzsch, Preussen; kun eksterl. gek-doj. — K-do W. Ludwig, Görlitzerstr. 28/II, Dresden: dez. k. — K-do Hermann Frahm, Neumünster, Haart 8; per il. pk. — K-do Max Schulze, Jordanstr. 21/III, Dresden-N.

**Rumenujo:** K-do Mitika Işoveanu, lignajisto; adreso: Socialista Klubejo, str. Piata Amzei 26, Bukarest; en ĉiuj landoj, precipe kun rusaj revoluciuloj.

**Hungarujo:** K-do Csikós F., V Visegradi u. 26 I 2, Budapeŝt; dez. kor. kun alilandaj gesamideanoj.



Al la tutmonda legantaro. Okazos dum Pasko (23—24 Marto) konferenco anarkiista en Holando. Ni pensis pri rimedo propagandi Esperanton inter konferencanoj, sed pro multe da malhelpoj, faritaj ne intence, ni ne multe sukcesis. Nun mi petas al la gekamaradoj, ke ili sendu al la konferenco simpatideklaron, en kiu oni parolu pri la utilo, kiun Esperanto jam havas kaj ankoraŭ povos havi por la movado anarkiista. Mi volonte ilin ricevos kaj mi ilin tradukitajn montros al la konferencanoj. Oni baldaŭ sendu al mia adreso siajn simpatiaĵojn: Adriaan Kloek, p/a. H. Holzderver, Limburg Stirumstraat 8/III, Amsterdam, Nederlando.

Pri propagando. La abonintoj kaj legantoj de I.S.R. en Ĥinujo, Mandjurujo, Italujo, Svisujo, Japanujo estas petataj sciigi siajn adresojn pri propaganda afero al F. M., Strub. 77 rue Lafayette, Rouen (Seine-Inf.), Francujo, sekr. de sekcio de „Liberiga Stelo”.

**Niaj Kalkuloj.** — En kaso la 28an de Dec. 123.87 guld. Ni ricevis (sole por I. S. R.): en Parizo: frankojn: Raimont 2.50, Héritier 2.50, J. Habert 2.50, Tiard 3.50; Nicolas 3.50, Bühlemann 2.50, Barguès 3.50, Aranaga 2.50, Rocher 3.50, Martini 2.40, Dauphin 2.50, Wiedemann 2.50, Panlou 2.50, Menage 2.50, Séjourné 2.50, Kruper 2.50, Aizière 2.50, vendo ponumere 1.40, kune 46.80 = 22.90 guld. En Amsterdam, guldenojn: Hyams 16.80, Cassin 1.14, Krauterkraft 1.66, Papp 1.80, Zuckerolli 4, Johnson per Fröding 1.20, Franc 4, Berggren 1.30, Meunier 1.20, Schneider 2.90, Voigt 29.79, Fleschütz (krom 140 akcioj) 14.40, Padfield 2.40, Toth V. 1, Meijer 5.85, Mariette 1.19, Wandert 2.10, Kady 1.61, Rebouillon 1.19, Giraud 1.19, Grezely 1.19, Inter-sindikata Esp. Grupo Marseille 1.19, Kitching 1, K. en Narva 5.40, Vrba 1.21, Toth per C. 2, Tarradella 2.70, Rodriguez 1.20, Krijt 1.20, Romeijn 1.10, Lluis 1.60, Racionala grupo 1.25, Lilli W. 1.20, Henning 2.36, Nicolau 1.20, Argentescu 0.60, Fryer 12, Hinton 1.20, Potorochin 7, Popov 1.80, Haensler 1.35, Ludwig 4.70, Wischniewski 3 (krom akcioj), B.—v. 4.80, ponumere 4, kune 148.77; entute 295.44.

Elspezoj: en Parizo: sendo, kor. kaj diversaj 9.55 fr. = 4.69 guld. Preso de 2a kaj 3a n-ro, sendo, korespondo k.t.p. 118 guld.; kune 122.69.

Enspezoj . . .	295.44 guld.
Elspezoj . . .	122.69 „
En kaso . . .	172.75 guld.